# Ĉarto 08

I . Antaŭparolo

Ĉijare estas la 100 jariĝo de la ĉina unua konstitucio, la 60 jariĝo de la Universala Ddeklaracio de Homrajtoj, la 30 jariĝo de "Demokratia Muro" en Beijing, kaj la 10 jariĝo de la subskribo de la ĉina registaro de Internacia Konvencio pri Civilaj kaj politikaj Rajtoj. Post la longa homrajta fatalaĵo kaj multfoje malfacilaj kontraŭbataloj, la vekiĝintaj ĉinaj popoloj klare konscias, ke libereco, egaleco kaj homrajto estas la komuna universala valoro de la homaro; demokratio, respublikismo kaj konstitucia regado estas la baza reĝimo de moderna politiko. La "Modernigado", kiu forlasas la menciitan universalan valoron kaj bazan reĝimon, estas la katastrofa procezo de forpreni la homrajton, korupti la homecon kaj detrui homan dignon. Kien iros Ĉinio en la 21a jarcento? Ĉu ni daŭrigas la "Modernigadon" sub la aŭtoritata regado aŭ konfesos la universalan valoron, kunfandiĝos en la ĉefa flua civilizacio kaj fondigos demokratian reĝimon ? Tio estas ne evitebla elekto.

La historia ŝanĝego en la mezo de la 19a jarcento malkovris la putrecon de la ĉina tradicia aŭtoritata reĝimo kaj tiris la antaŭ-akton de la "ne granda ŝanĝo dum kelke da mil jaroj" de Ĉinio. La "Okcidentiga Movado" nur simple strebis la reformadon en facilaj materialaj objektoj, kaj la malvenko de la Ĉina-Japana Milito de 1894-1895 refoje montris la eksmodecon de la tiama reĝimo; La Reformado de 1898 jam tuŝis la reformon de la reĝimo, kaj ĝi malvenkis finfine pro la kruela subpremado de obstinuloj; La Revolucio de 1911 entombigis forme imperiestran reĝimon, kiu daŭris pli ol 200 jarojn, kaj fondis la unuan respublikon en Azio, tamen pro la speciala historia situacio, la respubliko nur aperis kiel efemeraĵo, despotismo tuj revenis post la forto-restariĝo. La malvenkoj de la imitado de instrumentoj kaj reĝimo-renoviĝo igis ĉinon profunde mem-analizi la malsanan radikon de la kulturo. Poste tenante la flagon kun "Scienco kaj Demokratio", La Movado de la 4-a de Majo (1919) lanĉis la movadon nomatan "Nova Kultura Movado" kaj ĝi estis devigita rompiĝi pro la senĉesaj internaj militoj kaj invado de Japanio. Post la venko de la rezistmilito kontraŭ la japana agreso, Ĉinio refoje lanĉis la procezon de konstitucia reĝimo, tamen la rizulto de la interna milito inter Kuomintango kaj Kompartio faligis Ĉinion en la profundaĵon. "Nova Ĉinio" fundita en 1949 estas nomata "Popola Respubliko", fakte tio estas diktaturo de Kompartio. La reganta partio monopolas ĉiun politikan, ekonomian kaj socian profitfontojn, kaj faris multe da homrajtaj katastrofoj: la Kontraŭ-Dekstrula Batalo, la Granda Antaŭensalto, la Granda Kultura Revolucio, la 4a de Junio(1989) ktp, limigo al la popolaj religiaj aktivaĵoj kaj batadoj al homrajto-protektadoj, pro tio, miloj da popoloj perdis la vivon. La civitanoj kaj la lando pagis tro multe pro tio.

Pro la "Reformado" de la lasta periodo de la 20a jarcento Ĉinio forskuis la ĝeneralan malriĉecon kaj absolutan totalisman regadon dum la epoko de Mao Zedong, popola riĉeco kaj vivo altiĝas multe, popoloj ricevis parton da libereco en privata ekonomio kaj sociaj rajtoj, samtempe oni postulas pli da homrajtoj kaj politikajn liberecojn tago post tago. Kondukante la reformadon al merkatigo kaj privatiga ekonomio, la reganto komencis la ŝanĝiĝadon pri homrajtoj de la rifuzo al la malrapida konfesado. Ĉina registaro subskribis du gravajn internaciajn paktojn en 1997 kaj 1998. La Tutlanda Kongreso de la Popolaj Reprezentantoj enskribis "respekti kaj garantii homrajtojn" en

la konstitucion tra amendo de la konstitucio en 2004 kaj ĉijare permesis ellabori kaj efektivigi la Planon de Landa Homrajta Agado. Tamen tiuj politikaj progresoj nur restas sur la papero. La politika realo estas rigardata de ĉiuj, ke Ĉinio havas leĝojn, sed ne havas agadon laŭ legoj, havas konstitucion, sed ne havas konstitucian reĝimon. La reganta grupo daŭre persistas teni la aŭtoritatan regadon, kaj rifuzas politikajn ŝanĝojn. Tio kaŭzas putradon en la ŝtatoficista rondo, konstitucio ne funkcias, homrajto ne evidentiĝas, moralo degeneras, la socio polarizas, ekonomio evoluas anomalie, la medioj de la naturo kaj la sciencoj pri la homo estas detruas duoble, la rajtoj de civitanoj pri libereco, riĉeco kaj strebado de feliĉo ne havas la reguligan garantion, diversaj sociaj konfliktoj senĉese akumuliĝas, ne kontenta humoro daŭre altiĝas, precipe, la kontaŭstaro inter la ŝtato kaj la popoloj kaj amasaj kazoj multe pliiĝas. Tio montras la tendencon de la perdita regado kun katastrofeco. La postiĝo de la aktuala sistemo jam atingas la punkton de ŝanĝiĝo.

## II . Niaj fundamentaj principoj

Ĉe la historia turnopunkto koncerne al ĉina estonta sorto, introspektadi la modernigan procezon de la pasinta cent jaroj estas bezonata kaj ni reasertas jenajn fundamentajn principojn:

Libereco: Libereco estas la kerno de la universala valoro. La rajtoj de parolado, eldono, kredo, kunvenado, asociiĝo, transloĝiĝo, strikado kaj manifestaciado estas la konkretaj trajtoj. Sen libereco, ĉiam restos for de la moderna civilizo.

Homrajto: La homrajto ne estas degnita de la ŝtato, kaj ĉiu ĝuas la rajtojn ekde sia naskiĝo. Garantii homrajton estas la ĉefa celo kaj la laŭleĝa fundamento de la Publika Potenco, ankaŭ estas la interna postulo de “preni la interesojn de la popolo kiel la bazo de la politikofaro”. Ĉiufoja politika katastro en Ĉinio koncernis, ke la reganta aŭtoritato ignoras homrajtojn. Popolo estas la plej ĉefa parto de la ŝtato, la ŝtato servas al la popolo, kaj registaro ekzistas por popolo.

Egaleco: Ĉiu persono, malgraŭ ke la socia pozicio, profesio, sekso, ekonomia kondiĉo, raso, haŭtokoloro, religia aŭ politika kredoj estas malsamaj, tamen la personeco, digno, libereco estas egalaj. La Principoj de la egaleco antaŭ la leĝo kaj la civila egaleco de la socia, ekonomia, kultura, kaj politikaj rajtoj devas esti konfirmataj.

Respublikismo: respublikismo estas “kune direkti la ŝtatajn aferojn kaj kune ekzistadi”. Tio estas ekvibrigadoj de aŭtoritato kaj interesoj. Tio estas diversaj elementoj de interesoj, malsamaj sociaj grupoj, multkultura kaj kred-streba amasoj pace solvas la publikajn aferojn sur la bazoj de la egala partoprenado, justa konkurencado kaj kundiskutadao pri la ŝtataj aferoj.

Demokratio: La plej bazaj sencoj estas, ke la suvereneco apartenas al la popoloj kaj la popoloj balotas la registaron. Demokratio havas jenajn karakterojn:

1) la laŭleĝeco de la ŝtatpotenco devenas de la popoloj, kaj la politikaj potencoj devenas de la popoloj.
2) politika regado devas esti balotata de la popoloj.
3) civitano havas la veran rajton en la balotado. La ĉefaj ŝtatoficistoj de diversnivelaj registaroj devas esti elektataj en balotado periode.

4) la registaro devas respekti la decidon de plimulto, kaj samtempe protektas la bazajn homrajtojn de la malplimulto.

Unuvorte, demokratio igas la registaron kiel la modernan publikan instrumenton de “posedo de la popolo, administrado de la popolo kaj ĝuo de la popolo”.

Konstitucia Regado: Kostitucia Regado estas la principoj, kiuj garantias la bazan liberecon kaj rajtojn de civitanoj difinitaj tra la leĝo kaj la konstitucio. Konstitucia Regado difinas la limigon de la registara potenco kaj la amplekso de la agadoj, kaj provizas koncernajn administracia aparato.

En Ĉinio, la epoko de imperiestra aŭtoritato revenas neniam. En la monda amplekso, aŭtoritata reĝimo ankaŭ finiĝos tago post tago. Civitano devas esti la vera mastro de la ŝtato. Forigi la konsciojn de la regato depende de “klerigita imperiestro” kaj “honesta kaj justa ŝtatoficisto”, publikigi civitan konscion pri preni rajtojn kiel la bazon kaj partoprenadon kiel devon, praktiki liberecon, disvastigi demokration, kion oni radikas, estas la ĉefa elirvojo de Ĉinio.

III . Niaj bazaj proponoj

Kun la civila konscio de la respondeco kaj la konstrueco al la ŝtata reĝimo, civilaj rajtoj kaj evoluadoj de la socio, ni donas jenajn konkretajn proponojn:

1. Amendo de la konstitucion: Amendu la konstitucion laŭ la menciitaj volor-principoj, forstreku de la nuna konstitucio la artikolojn, kiuj ne taŭgas al la principoj de suvereneco en popoloj. Lasu la konstitucion vere fariĝi la garantia atestilo de homrajtoj kaj la permesa atestilo de publika potenco. Lasu ĝin fariĝi praktikebla la plej alta leĝo, kiun kiu ajn persono, organizo kaj politika partio ne povas malobei. Tio metas la fundamenton por ĉina demokratiigo.

2. Apartigo de potencoj: La moderna registaro kun la apartigo kaj ekvilibrigo de la potenco devas esti establata, la apartigon de leĝdono, jurisdikcio kaj ekzekutivo devas esti garantiata. Por eviti tro da ekspansioj de administraciaj potencoj, la principoj de la administraciado sub la leĝaro kaj la registara respondeco devas esti firmataj. La registaro devas respondeci al la impostopagantoj. La sistemo de apartigo kaj ekvilibrigo inter la centra kaj lokaj registaroj devas esti establata. La potenco de la centra registaro devas esti klarigata kaj degnata de la konstitucio. Efektivigu planan lokan aŭtonomion

3. Leĝdona demokratio: Diversnivelaj leĝdonaj organoj devas esti rekte balotataj. Leĝdonado devas teni la principojn de la justeco kaj la honesteco. Efektivigu leĝdonan demokration.

4. Sendependa justico: Justico devas super la partioj kaj ignoras iajn ajn intervenojn. Efektivigo de la sendependa justico garantias la justican justecon. La ŝtato devas establi la konstitucian juĝejon, starigi la esploran sistemon de la kontaŭkonstitucio, protekti la konstitucioan aŭtoritaton. La ŝtato devas kiel eble plej baldaŭ abolicii la diversnivelajn komunistajn komitatojn de politiko kaj juro, tio evitos la publikan instrumenton esti uzata private.

5. Publikaj instrumentoj al la publiko: La ŝtato devas efektivigi la ŝtatigon de la armeo, la militistoj devas esti fidelaj al la konstitucio kaj la ŝtato. La organizoj de la komunista partio devas forlasi la armeon, kaj la armeo devas altigi sian nivelon. De la profesiigo. Ĉiuj ŝtatoficistoj, enkluzive policanoj, devas esti neŭtralaj en politiko. Dum la dungado de la ŝtatoficistoj, la diskriminacio de politikaj partioj devas esti malaperigata kaj esti dungata egale.

6. Garantiado de Homrajtoj: La homrajtoj devas esti vere garantiataj kaj la homa digno devas esti respektata. La ŝtato devas establi la homrajtan komitaton, kiu nur respondas al la plej alta instanco pri popola volo, tio evitos la ŝtaton tro uzi la publikajn potencojn kontraŭ homrajto, precipe la registaro devas garantii la liberecon de civitanoj kaj neniu ricevus areston. La sistemo de la fiziklabora reedukado devus esti aboliciata.

7. Balotado de publikaj respondeculoj: La sistemo de la demokratia balotado devus esti plene aplikata, la egaleca voĉdona rajto je unu persono po unu voĉdono devus esti efektivigata. La administraciaj respondeculoj de ĉiuj niveloj devus esti elektataj en rekta balotado iom post iom. La libera konkurado en la balotadoj devus esti okazigata regule. Partopreno en la balotado de publikaj respondeculoj estas neforigeblaj bazaj homaj rajtoj de civitanoj.

8. Urb-kampara egaleco: La aktuala registriĝa sistemo de urb-kampara familioj devus esti nuligata. La egalrajteco por ĉiuj civitanoj antaŭ la konstitucio devus esti efektivigita. La rajto de libera transloĝiĝo por civitanoj devus esti protektata.

9. Libera asociiĝo: La civitana rajto de libera asociiĝo devas esti garantiata. La aktuala sistemo de la registriĝo kun kontrolo kaj aprobo por la civilaj sociaj organizaĵoj devas esti ŝanĝata kiel la sistemo “enregistrigi en dosieron”. La malpermeso de libera organiziĝo de politikaj partioj devus esti nuligata. Ĉiuj aktivecoj de partioj devus esti reguligata sub la konstitucio kaj la leĝo. La reg-privilegio de unupartia monopolo devus esti nuligata. La principoj de la liberaj aktivecoj de politikaj partioj kaj justa konkurso devas esti establata. La normaligo kaj leĝigo de partia politiko devas esti efektivigata.

10. Libera kunvenado: Pace kunveni, protesti, manifestacii kaj esprimi la liberecon estas la bazaj rajtoj difinitaj de la konstitucio, tio ne devas esti intervenata kontraŭ la leĝo kaj limigata kontraŭ la konstitucio de la reganta partio kaj la registaro.

11. Libera sinesprimado: La libereco de parolo, la liberoj de eldonoj kaj disertoj devus esti efektivigata. Civitanaj rajtoj pri la sciiĝo kaj inspektado-kontrolado devus esti protektata. La ŝtato devas ellabori “Leĝaro pri Novaĵoj” kaj “Leĝaro pri Eldonoj”. La malpermeso de liberaj eldonoj de ĵurnaloj kaj gazetoj devus esti nuligata. La klaŭzo de “la krimo de la instigado por subfosi ŝtatan reg-potencon” en la aktuala “Kriminala Leĝo” devas esti aboliciata, tio evitos, ke civitanoj ricevas la punon pro siaj paroloj.

12. Religia libereco: La religia libereco kaj kredo devas esti garantiata, la apartigo de religio kaj ŝtato devas esti efektivigata, la religiaj kred-aktivaĵoj devas esti ne intervenigataj de la ŝtato. La administraciaj leĝoj, administracia reguloj kaj lokaj leĝoj, kiuj limigas aŭ forprenas religian kredan liberecon de civitanoj, devas esti kontrolataj kaj aboliciataj. Administri religiajn aktivaĵoj per la administraciaj leĝoj devas esti malpermesata. La sistemo de la anticipa aprobo de religiaj organizoj (enkluzive la

preĝejoj) per de la registriĝo por laŭleĝo devas esti abolicata, kaj anstataŭ tio estas la sistemo de enregistrigo en dosieron sen kontroloj.

13. Edukado de civitano: La politika edukado kaj politikaj ekzamenoj, kiuj nur servas al la regado de la reganta partio kaj kunportas fortan ideologian koloron, devus esti nuligataj. La edukado de civitano pri universalaj valoroj kaj civitanaj rajtoj devus esti disvastigata. La civitana konscio devus esti establigata. La civitana virto de la servado al la socio devus esti iniciatigata.

14. Protekto de propraĵo: La privata proprieto devus esti establigata kaj protektigata. La libera kaj malferma merkateknomia sistemo devus esti efektivigata. La libereco de entrepreno-establo devus esti garantiata kaj la administracia monopolo devus esti forigata. Pri ŝtata havaĵo la ŝtato devas establi la administran komitaton, kiu respondas al la plej alta instanco pri popola volo. La proprieta reformado devus esti lanĉata orde laŭleĝe. Al kiu persono aŭ respondulo la proprieto apartenas, tio devus esti evidentigata. La ŝtato devas lanĉi novan agraran reformadon kaj ŝovas la privatigon de agraro kaj garantias la agraran proprieton de civitanoj, precipe la kamparanoj.

15. Financa kaj imposta reformadoj: La ŝtato devas efektivigi demokratian financon kaj garantii la rajtojn de impostopagantoj, kaj starigas la sisteman kadron de publika financo kun klaraj respondeco kaj rajtoj. La diversnivelaj registaroj devas establi racian kaj efikan financan sistemon por la apartigo de potencoj. La ŝtato devas fari gravan reformadon al impostan sistemon por malaltigi la impostan procenton, simpligi la impostan sistemon, justigi la impostan ŝarĝon. Sen la proceso de la socia publika elektado kaj rezolucio de la instanco pri popola volo, administraj organoj ne povas libere altigi imposton kaj rekzicii novajn impostojn. La ŝtato devas enkonduki Multmerkatumom kaj konkursan reĝimon tra la reformado de proprieto, kaj reduktas la sojlan eniron de financo, kaj kreas favorajn kondiĉojn por la evoluado de popola financo. Tio igas la financan sistemon havi plenan viglecon.

16. Sociala asekuro: La sociala sekura sistemo kovrata al la civitanaro devas esti establata kaj civitanoj devas ricevi la plej bazajn garantiojn en edukado, kuracado, ĝuado en la emeriteco kaj laboro.

17. Protektado de la medio: Ni devas protektadi la ekologian medion, stimulas la kontinueblan evoluadon kaj respondos por la postuloj kaj la tuta homaro. La ŝtato devas ekspliciti la respondecon de diversnivelaj ŝtatoficistoj en la protektado de la medio. Neregistaraj organizoj devas plene ludi la gravan rolon de la partoprenado kaj kontrolado en la protektado de la medio.

18. Federala Respubliko: Ĉinio devas partopreni kaj teni la regionan pacon kaj evoluadon kun la konduto de egaleco kaj justeco, kaj portretas la respondecan grandan landon. La libereca sistemo en Honkongo kaj Mekao devas esti bone tenata. Sub la premiso de libereco kaj demokratio ni devas serĉi paciĝan projekton inter ambaŭ bordoj de tajvana margorĝo tra egalaj intertraktoj kaj kunlaboroj. Ni devas esplori la eblecon kaj sistemon por prosperado kune kun la diversaj nacioj kaj starigus Ĉinan Federacian Respublikon en la kadro de demokratia konstitucia reĝimo.

19. Konfirmo de justeco: la ŝtato devas redoni la reputaciojn de tiuj, kiuj kaj kies

familianoj estis persekutitaj en la pasintaj politikaj movadoj, kaj donas ŝtat-kompenson.. la ŝtato devas liberigi ĉiujn politikajn kaj konsciencajn krimulojn kaj liberigi ĉiujn kaptitojn pro sia kredo. La ŝtato devas starigi la vero-enket-komisionon, kaj enketas la veron de la historiaj kazoj, kaj klarigas la respondecon, konfirmas justecon. Sur tiu bazo, oni serĉas la socian repaciĝon.

## Epilogo

Ĉinio kiel granda lando, unu el la kvin konstantaj membroj de la Sekureca Konsilio de UN kaj membro de Homrajta Konsilio, devas fari sian kontribuojn al la pacaj aferoj de la homaro kaj progresado de homrajto. Estas bedaŭrinde, el la aktualaj grandaj landoj de la mondo, nur Ĉinio estas regata en la aŭtoritata politika vivado. Tio kaŭzas senĉesajn homrajtajn katastrofojn kaj sociajn krizojn kaj tio ligas sian evoluadon de ĉinaj nacioj kaj limigas la progresadon de homara civilizacio. La situacio devas esti ŝanĝata! La reformado de politika demokratiigo ne povas esti prokrastigata！

Pro tio, kunportante la civitanan spiriton de kuraĝa praktikado, ni publikigas “Ĉarto 08”. Ni esperas, ke ĉiuj ĉinaj civitanoj, ĉu ŝtatoficisto ĉu plebo, ĉu altranga ĉu malaltranga, kiuj havas la samajn senton de la krizo, respondeco kaj misio, kun interkonsento rezervante malsamon aktive partoprenu al la civitana movado kaj ni kune antaŭenigu la grandan reformadon de la ĉina socio por pli frue starigi la ŝtaton kun konstitucia reĝimo, demokratio kaj libereco, kaj efektivigu la senlacan strebadon kaj songĝadon dum pli ol cent jaroj.